

ESPERANTO

sub la suda kruco

decembro 2019





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Volumo 26[4] numero 137 decembro 2019

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktistoj: Terry Manley, Joanne Johns

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA - ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: www.esperanto.org.au / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn trudukojn (ekz. per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-an de februaro 2019

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi eldonaĵo respondekas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2019 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: Kristnaska ornamaĵo

ENHAVO

Kion ni povas lerni de aborigenoj	04
Elstaraj atingoj de la homaro	06
Ĉu la granda debato devas daŭri?	08
Fotoj el la AEA-a arĥivo	10
Vortumi	11
Bicikli estas simpla, ritma kaj paca	12
Le EO-movado en Ĉinio kaj Japanio	16
Senpluveco	19
Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Kongreso	21
Bonfarta tago pri la sensoj	23
Bab.la	26
Anstataŭaĵo por rompita orgeno	27

Antaŭparolo

TERRY MANLEY

Mi tre dankas al Joanne pro ŝia laboro eldoni la Septembra numero de ESSK. Amiko de mi, kiu planis bicikli al Melburno, informis min je la komenco de Aŭgusto ke li baldaŭ planas foriri. Tio iom surprizis min ĉar mi deziris almenaŭ komenci la vojaĝon kun li, sed sciis ke ĝi interrompos mian redaktadon de ESSK ĉar survoje mi ne havos la rimedojn plenumi tiun taskon. Do meze de Aŭgusto mi komencis bicikli kaj tio daŭris dum monato.


Do refoje dankon al Joanne, kun Vera kaj Donald, pro la ekfaro de la Septembra numero dum mia foresto. Ĝi ja aspektis kaj legiĝis bone kaj interese.

Legu plu pri mia vojaĝo en ĉi tiu numero.

Klara stilo

D E ROGERS

En la septembra numero de ESSK, aperis tri artikoloj de Joanne Johns: *Kiel bibliotekoj adaptiĝas al la moderna mondo*, *Kiel mi memoris 180 ciferojn de Pi*, kaj *Nova vortludo por Esperantistoj*. Tiuj artikoloj estas interesaj kaj bonegaj ekzemploj de klara esperanteca stilo. Mi gratulas al Joanne kaj mi esperas ke verkontoj imitos ŝian klaran stilon.



Kion ni povas lerni de aborigenoj

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Majoro Thomas Mitchell estis baze deca homo, kiu “malkovris” grandan parton de la sud-orienta parto de la aŭstralia kontinento: tio estas, li estis la unua eŭropano, kiu estis tie. Sed aborigenoj jam vivis tie dum dekoj da jarmiloj; li bone sciis, ke ili vivas tie, li estis en aborgenaj vilaĝoj kaj admiris la domojn tiel lerte konstruitajn, kaj li supraj konatiĝis kun kelkaj aspektoj de la aborigena kultivado de kampoj de

ignamoplantoj (angle yam). Li honeste bedaŭris, ke la eŭropana invado forprenas de ili la liberecon antaŭe ĝuatan laŭvole vagadi tra siaj tradiciaj sovaĝejoj.

Tamen Mitchell skribis, rigardante la belajn ebenaĵojn de la estonta Viktorio:

Tero tiel invita, kaj tamen sen loĝantoj! Kiam mi staris, la unua eŭropa sintrudanto sur la majestan solecon de tiuj verdaj ebenaĵoj ankoraŭ ne tuŝitaj de bestogregoj; mi konsciis, ke mi estas la heroldo de potencaj ŝanĝoj; kaj ke niaj paŝoj estos baldaŭ

sekvotaj de la homoj kaj bestoj, por kiuj la tero ŝajnis preparata. (Interpunkciado de Mitchell).

Alivorte, la aborigenoj tie vivantaj ne vere ekzistis kiel homoj: ili estis eble parto de la faŭno. La tero ankoraŭ atendis la alvenon de "veraj homoj" kaj iliaj fremdlandaj bestoj, kaj Mitchell fieris, ke li estas la pioniro de tiu venonta evoluo.

Eĉ pli fama "malkovranto" de "sovaĝaj" partoj de Aŭstralio estis kapitano Charles Sturt. Li skribis en sia taglibro pri ekspedicio en la ege varma dezerta regiono de Cooper's Creek, kiam lia teamo preskaŭ pereis pro varmego kaj manko de akvo kaj manĝaĵoj kaj neatendite troviĝis en aborigena vilaĝo. Lia unua reago estis timo:

Se tiuj homoj estintus malamikaj, ni neniel povintus eskapi, ĉar niaj ĉevaloj ne kapablis ekgalopeti por savi nin aŭ sin. Ni do estis komplete submetitaj al ili ... sed ili tute ne montris malafablan senton, ili traktis nin per aŭtenta gastamo, kaj ni povintus peti ion ajn de ili. Kelkaj el ili alportis al ni grandajn akvotenuojn, kaj post kiam ni iom trinkis, ili tenadis ilin, ke niaj ĉevaloj trinku; ekzemplo de kuraĝo tre miriga, ĉar mi estas certa, ke neniu blankulo (neniam vidinte ĉevalon, kaj kun la komprenebla nervozeco pro la aspekto de tia besto) intence alirus tion, kio devus ŝajni al li tre timiga bruto ... Krome ili proponis al ni rostitan anasaĵon kaj iom da kuko. Kiam ni piediris al ilia loĝloko, ili indikis grandan novan kabanon, kaj diris, ke ni povas dormi tie ... kaj poste ili alportis al ni stakon da bastonoj, ke ni faru fajron; ligno estis ege malofte havebla.

Sturt iom detale skribis pri la plaĉaj konstruaĵoj de aborigenaj vilaĝoj kaj pri

ilia agrikulturo kaj fiŝkaptaj metodoj. Ankaŭ li lamentis pri la sorto de la aborigenoj fronte al la alveno de eŭropanoj, sed la "solvo" laŭ li estis forpreni aborigenajn bebojn de iliaj gepatroj, ke la beboj ne konu la vivon de tiuj gepatroj kaj (supozende) ne funebru pri la perdita kulturo. Li skribis: ... la sola rimedo estas ... komplete apartigo de la infano for de liaj gepatroj ... nenio bona rezultos el la pleja persistemo pri filantropio ... ĝis la infanojn oni tenas en tiel komplete senscio pri siaj antaŭuloj, ke ili rigardu tiujn ĉi same kiel eŭropanoj, nome kun surprizego kaj simpatio.

Kiom ni scias, nek Mitchell nek Sturt murdis aborigenojn, sed iliaj posteuloj kompensis pro tiu "manko". En la deknaŭa jarcento apliko de primitiva interpreto de darvinismo kaj de brita juro certigis, ke la agnosko de kulturaj atingoj de aborigenoj estis forviŝita. Oni nomis la aborigenojn "ĉasistoj-kolektistoj", t.e., homoj sur la plej malalta nivelo de evoluo. Laŭ brita juro, eĉ se homoj vivas sur specifa tereno sed ne kultivas ĝin, ili ne vere posedas ĝin. Do la senkulturaj sovaĝuloj ne posedis la teron, ĝi estis nenies, terra nullius. Ne estis juraj obstakloj al la eŭropana ekposedo de la tero. Krome, socia darvinismo proklamis, ke homa progreso postulas, ke pli fortaj homgrupoj venku malpli fortajn, kaj en la deknaŭa jarcento eŭropanoj estis videble la plej fortaj sur la planedo, la "supera raso".

En 2014 aperis libro de Bruce Pascoe kun la titolo Dark Emu (malhelkolora emuo). Pascoe arigis informojn ĉefe el la skribaĵoj de la plej fruaj eŭropaj "malkovristoj" kaj setlintoj, kiuj klare montras, ke la kulturo de la aborigenoj estis multe pli rafinita, pli "altnivela" ol la

bildo prezentata de nia eduka sistemo kaj amaskomunikiloj. Kelkaj nuntempaj antropologoj forte revizias la tradician bildon de nomada ĉasisto.

Necesas legi la libron por ekscii detalojn, sed jen resumo de la konkludoj: estis aborigenaj vilaĝoj kun bone konstruitaj domoj malgraŭ manko de modernaj konstruiloj; aborigenoj havis tre grandajn kaj lerte konstruitajn kaptilojn en riveroj kaj maroj por kapti fiŝojn; aborigenoj kultivis ignamojn kaj rikoltis herbosemojn por fari tre bongustajn kukojn; aborigenoj sciis prilabori eĉ normale danĝerajn plantojn por fari el ili sendanĝerajn manĝaĵojn; aborigenoj tre lerte uzis fajron kiel ilon por plibonigi la fekundecon de la grundo; aborigenoj havis evoluintajn leĝojn por eviti militon inter triboj, tiel ke ... ne estis militoj por forpeni ies teritorion.

Ili ne sklavigis unu la aliajn. Ne estis rilatoj de mastroj kaj servantoj. Ne estis klasdividoj. Ne estis malegaleco rilate posedaĵojn.

Pli profunde, Pascoe argumentas, ke se ni adoptus aborigenajn manierojn pritrakti la teron, se ni uzus la riĉaĵojn de nia foje magra kontinento en ilia maniero, se ni uzus fajron kiel ili faris, se ni forigus malmolhufajn bestojn de nia grundo kaj uzus la bestojn, kiuj evoluis por adaptiĝi al la cirkonstancoj, se ni kultivus la plantojn, kiuj vivtenis la aborigenojn dum jarmiloj, ni eble trovus eliron el la ekologia katastrofo, kiu rezultos el trudado de eŭropaj pensmanieroj al tiu ĉi neeŭropa kontinento.


Mi rekomendas legadon de Dark Emu.

Elstaraj atingoj de la homaro

Adapte elangligis Donald Rogers el Enlightenment Now de Steven Pinker, 2018.

Ni eble pensas pri homaj rajtoj, la abolo de sklaveco, kaj la venko kontraŭ facismo. Sed tiuj gravaj aferoj konsistis el la forigo de obstakloj kiujn ni mem starigis. Ni povas inkludi la majstroverkojn de la artoj, muziko kaj literaturo. Tamen la plej eminenta fako estas scienco.

Per scienco ni povas ekspliki pri la historio de la universo, la fortoj kiuj regas ĝin, la materio el kiu ni konsistas, la origino de vivuloj, la maŝinaro de la vivo, eĉ pri la mensa vivo. Kvankam multo estas nekonata, nia kolektiva scio estas vasta, kaj daŭre kreskanta. La fizikisto Sean Carroll argumentas, en The Big Picture, ke la leĝoj de fiziko, subkuŝantaj la ĉiutagan vivadon (tio estas, escepte de



ekstremaj aferoj, kiel la nigraj truoj kaj la malluma materio) estas tute konataj.

En la vivanta mondo, oni jam science priskribis unu milionon kaj duonon da specioj, kaj per realigeble pligrandiga peno, oni povos nomi la restantajn sep milionojn en ĉi tiu jarcento. Nia kompreno la mondon konsistas en ne nura listigo de partikloj kaj fortoj kaj specioj, sed en profundaj, elegantaj principoj, ekzemple, ke la gravito estas kurbiĝo de la kosmo-tempo, kaj ke la vivo dependas de molekulo kiu portas informon, regas metabolon, kaj reproduktas sin.

Sciencaj malkovroj daŭre mirigas, ravas, respondi la antaŭe nerespondeblajn. Kiam Watson kaj Crick malkovris la strukturon de DNA, ili ne povis imagi la tagon kiam iu analizos la genaron de 38000-jara fosilia neandertalo, kaj trovos genon kiu rilatas al la parolkapablo kaj lingvo, aŭ kiam analizo de la DNA de Oprah Winfrey informos ŝin, ke ŝi estas praido de la Kpelle-popolo, kiu loĝis en la pluvbarbaro kie nun troviĝas Liberio.

La scienco verŝas novan lumon sur la homa kondiĉo. La konataj pensuloj de la antikveco kaj de la Epoko de Racio, naskiĝis tro frue por ĝui ideojn kun profundaj implicoj por moraleco kaj signifo, inklude entropion, evoluadon, informadikon, kaj artan inteligenton. La problemoj, kiujn tiuj pensuloj prezentis al ni, nun riĉiĝas pro tiaj ideoj, kaj oni esploras per metodoj kiel tridimensia bildigo de la cerba aktivado kaj la minado de vastaj datumaroj por spuri la disvastigadon de ideoj.

La scienco jam donis al la mondo bildojn ekstravagance belajn: stroboskope senmovigitaj, grandioza faŭno el tropikaj pluvbarbaroj kaj

profundmaraj oceanaj truoj, graciaj spiralaj galaksioj kaj diafanaj nebulozoj, fluoreskaj nervaj cirkvitoj, kaj luma Planedo Tero leviĝanta super la horizonto de la Luno en la nigreco de la kosmo. Kiel grandaj artverkoj, tiuj estas ne nur belaj bildoj, sed instigas kontempli nian komprenon pri tio, kion signifas esti homa, kaj pri nia loko en la naturo.

La scienco donis al ni donacojn pri vivo, sano, riĉeco, scio, kaj libereco. Prenante nur unu ekzemplon, scienca scio forigis la variolon, doloran malbeligan malsanon kiu mortigis 300 milionojn da homoj en la 20-a jarcento.

Tiuj imponaj atingoj nuligas la plendojn, ke ni vivas en epoko de degenerado, elrevigo, sensignifeco, malsincereco, aŭ absurdeco. Sed nuntempe la belecon kaj povon de la scienco iuj homoj subtaksas kaj akre indignas.

La malrespekto por la scienco troviĝas en surprizaj lokoj: ne nur inter religiaj fundamentistoj kaj nesciaj politikistoj, sed inter multaj eminentaj usonaj institucioj pri klerigado.



Ĉu la granda debato pri klimatoŝanĝo devas daŭri senfine?

JONATHAN COOPER (GOSFORD)

Ne mankas homoj, kiuj deklaras, ke klimatoŝanĝo estas reala kaj, se ni ne agos rapide kaj decide, la mondo iros al nekontraŭigebla katastrofo. Aliflanke, ne estas malfacile trovi tiujn, kiuj kontraŭas tiun vidpunkton, ĉu skeptike (asertante, ke la pruvoj estas nekonkludeblaj) aŭ certe (asertante, ke tute ne ekzistas pruvoj). Interese, tiuj de ambaŭ flankoj diras, ke ili povas trovi “spertulojn”, kiuj subtenas ilin. Do, kion ni devus kredi kaj, pli grave, kion ni devus fari?

Multaj homoj argumentas per statistikoj pri la nombro da sciencaj artikoloj ambaŭflankaj. Kompreneble la kvalifikoj kaj reputacio de ĉiu sciencisto, kiu prezentas pruvojn – kaj eltiras konkludojn el tiuj pruvoj – estas gravegaj por decidi kiom da atento li aŭ ŝi indas. Sed eĉ tiujn estas malfacile determini. Kutime oni ĉefe konsideras ties famon (ekz-e David Suzuki aŭ Tim Flannery). Plue, onia opinio estas ofte plejparte decidita antaŭ ol oni ekzamenas pruvojn aŭ argumentojn, bazite sur ĝeneralaj politikaj kaj ideologiaj kredoj.

Do, ĉu la solvo estas, ke ni ĉiuj faru universitatajn kursojn en klimatologio kaj ne decidu ĝis ni atingos almenaŭ doktoran nivelon kaj povos ekzameni kaj kompreni la pruvojn per ni mem? Aŭ, ĉu ni uzu bazan kritikan rezonadon, kaj iajn ajn informojn kaj komprenojn nun disponeblajn al ni?

Ni devas unue priskribi la aferon klare kaj precize. La demando ne estas “Ĉu la tera klimato vere ŝanĝiĝas?” sed “Ĉu homa agado faras rimarkeblan kaj negativan efikon sur la tera klimato?” Se la klimato fakte ŝanĝiĝus, sed ĝi estus parto da granda natura ciklo, tiukaze, kvankam estus bedaŭrinde, ne necesus ŝanĝi nian konduton rilate al karbon-eligado.

La veto de Pascal

Blaise Pascal, franca filozofo de la 18-a jarcento, faris interesan kontribuon al la tiutempa filozofia debato pri la ekzisto de Dio. Li rigardis, ne la pruvojn, sed la konsekvencojn de kredi, aŭ ne kredi. Pascal prezentis kvar eblecojn, bazitajn sur ĉu aŭ ne Dio ekzistus kaj ĉu aŭ ne oni kredus je Dio: Se Dio ekzistus sed oni ne kredus, oni estus punata per eterna damniĝo. Se Dio ekzistus kaj oni ja kredus, oni estus rekompencata per eterna vivo en la ĉielo. Se oni kredus je "Dio" sed neniu tia estulo fakte ekzistus, onia pieco estus "malŝparita", tamen aliflanke, ekzistus nek rekompenco nek damno post morto. Fine, se oni estus ateisto kaj oni pravus (t.e., ne ekzistas Dio), oni simple vivus por oni mem kaj morto estus fina, kiel oni atendus.

Do, simile, ni supozu, ke oni ne povus decidi la veron pri klimatoŝanĝo. Tio donas al ni la jenajn kvar eblecojn:

Ago	A. Se homa agado kaŭzas klimatoŝanĝon	B. Se homa agado NE kaŭzas klimatoŝanĝon
1. Faru nenion	• Tutmonda katastrofo	• Nenia ŝanĝo
2. Fari ion (redukti CO ₂ -eligadon, ktp)	• (Espereble) katastrofo evitata, aŭ malgrandigata	• (Espereble) katastrofo evitata, aŭ malgrandigata • Poluaĵo malgrandigata • Iom da nenecesa elspezo • Iom da nenecesa timo

Parenteze, unu granda problemo pri la originala veto de Pascal estas, ke simple diri, "Mi nun kredas je Dio," ne estas same kiel reala kredo je Dio. (Oni supozas, ke Dio konus la diferencon inter la du!) Tamen, neniu simila problemo ekzistas se oni aplikas la saman ĝeneralan principon al la afero de klimatoŝanĝo.

Do, eĉ se oni supozus, ke klimatologoj estus pli-malpli egale dividitaj laŭ siaj opinioj, eĉ se oni supozus, ke la pruvoj estus vere nekonkludeblaj (ne nur la normala, scienca necerteco), tiuokaze la relativaj konsekvencoj estus ege neegalaj. La du negativoj, indikitaj en la ĉeloj A1 kaj B2 supre, estas: katastrofaj unuflanke, kaj nur malkomfortaj kaj maloportunaj aliflanke. Laŭ mi, la elekto estas klara.

(Notu: Tio baziĝas sur angla-lingva afiŝo en mia forlasita, tamen ankoraŭ aktuala blogo, *Some thoughts about...*, de 2009. Tamen, mi kredas, ke ĝi estas tiel trafa kiel iam ajn. Verŝajne pli.)

Fotoj el la AEA-a Arĥivo

Ĉu vi povas identigi la personojn, lokojn aŭ jarojn?

Sendu tiujn al esk@esperanto.org.au



Foto 1



Foto 2



Foto 3



Foto 4



Foto 5

Vortumi

TERRY MANLEY (ARMIDALE)

Esperanto estas kreoplena lingvo pro la afiksoj kaj ebleco kunligi ilin por krei novajn vortojn aŭ almenaŭ neofte vidatajn vortojn. Umi estas vorto utila por helpi kreadon de novaj vortoj.

Antaŭ dudek jaroj, post la morto de Esperanta amiko Brian Currie, mi vagis en la arbaro apud mia tiama domo en Cheltenham, Sidnejo. Brian ofte piediris en naturaj lokoj do mi iel sentis ke li kuniras kun mi. Kvankam Brian, laŭ mia scio, ne kredis je postmorta vivo aŭ konscio, dum mia promeno mi ekpensis ke Brian "ĉielumas". Mi mense kreis tiun vorton el ĉielo kaj umi - umas en la ĉielo. Sed mi baldaŭ notis ke oni ankaŭ povas apartigi la vorton en partojn ĉie kaj lumas. Tre taŭge.

Por Ĉiamo

Amikon mian trafis morto
Tro juna por suferi en tia sorto
Lukte spiradis je lastmomento
Okuloj glazuris sur firmamento.

Sub angoforarbe altstatura
Mi vagis apud river' tre pura
Ĉie lumis sunradioj
Sur la grund' en brilaj strioj.

Mi alparolis amikon koran
"Ĉu vi umadas ĉielon foran?"
"Mi ĉielumas en libero
For de peza termizero."

Laŭ tielo, pro tialo
Feliĉas mi en tiu valo.
Brulas en mi koroflamo
Pro ĉi amo, por ĉiamo.



Biciklante apud fervojo kaj Goonoo Naturokonservejo

Bicikli estas simpla, ritma kaj paca maniero trairi la landon.

TERRY MANLEY (ARMIDALE)

Antaŭ 25 jaroj (kaj pli) mi ofte biciklis longajn distancojn. Almenaŭ unu fojon en ĉiu jaro mi enpakis la necesojn, ŝargis tiujn surbicile kaj forajdis en iu direkto en Aŭstralio. Foje trairante partojn de mia ŝtato NSK, multfoje biciklante de Sidnejo al Melburno de kie mi trafis pramŝipon al Tasmanio kaj ĉirkaŭis tiun ŝtaton, kaj eĉ unufoje ĉirkaŭ Aŭstralio 1989-1991 dum kiu mi lernis Esperanton.

En 1994 mi edziĝis kaj filino alvenis en 1996. Do mia soleca biciklado ĉesis, kvankam mi daŭre uzis la biciklon por loka veturado kaj mallongaj vojaĝoj kun familio.

Do, kiam en Julio amiko diris al mi ke li planas bicikli al Melburno, mi ekinteresiĝis. Sed

duboj entrudis. Ĉu mi ankoraŭ kapablas bicikli tiom? Ĉu ni harmoniiĝos survoje? (Miaj antaŭaj vojaĝoj estis solecaj.) Kio pri laboroj kaj paga kaj volontulaj? Kion mia edzino diros? Sed kun kuraĝigo de mia edzino kaj kunlaborantoj mi feliĉe forbiciklis suden kun mia amiko Phil.

Phil jam planis sian vojaĝon dum monatoj.



*Terry sur ponto super "La Bidĝi"
(Murrumbidgee Rivero)*



Phil apud "La Bogan"

Per komputilo li esploris kvietajn vojojn por eviti aŭtomobilojn. Do kun tendo, dormosako, kuirpoto kaj ceteraj necesaj, li planis vojaĝi dum 4-6 semajnoj. Por la plejparto de la vojaĝo li planis apudiri fervojojn aŭ laŭiri malnovajn bovovojojn. Li elektis la fervojojn ĉar tiuj estas la plej ebenaj, kaj la bovovojojn ĉar tiuj provizas

bonajn tendumlukojn.

Do nia vojo kondukis nin el Armidale tra Walcha Road, Limbri, Tamworth, Werris Creek, Premer, Binnaway, Dubbo, Parkes, Temora, Rutherglen kaj Wangaratta. Ĉe Wangaratta ni decidis apartiĝi kaj Phil iris okcidenten al Melburno, dum mi kaj mia filino, kiu renkontis nin ĉe la ŝtatlimo, biciklis orienten al Bright kaj reen al Wangaratta.

La monato por mi estis neforgesebla kun stelplenaj tendumejoj, varmigaj tendumfajroj, kamparaj vidaĵoj kaj bonharmonia amikiĝo. La vojoj foje estas ne tre ebenaj apud la fervojoj sed ĉiam trankvilaj kaj sendanĝeraj kompare kun



Fajro en seka riveretfluejo

la ŝosejoj, kiu ofte havas grandajn ŝarĝaŭtojn kaj foje ne estas tre larĝaj. En Viktorio mi kaj mia filino uzis la porbiciklan vojon inter Wangaratta kaj Bright kiu antaŭe estis fervojo. Tiun estas plezure bicikli. En NSK nuntempe estas provoj por ŝanĝi neuzatajn fervojojn en biciklajn vojojn sed ofte la provoj estas kontraŭataj de bienistoj aŭ fervojamantoj. Mi kaj Phil trovis ian

solvon per la uzo de la apudfervoja vojo. Kvankam la uzo estas neaprobata de la fervojfako, tiuj vojoj certe estas multe pli preferindaj ol la ŝosejoj. Kun iom da plibonigo oni povus havi retejon de vojoj por bicikloj apud la fervojoj tra la ŝtato.



Phil kaj Terry "ĝis la" ôe Wangaratta

KONTRIBUU

al

La limdato por la
venonta numero estas la
15-a de februaro. Sendu
artikolojn, rakontojn,
enigmojn, receptojn,
fotojn ktp al
esk@esperanto.org.au -
ni bezonas vin!



ESPERANTO

sub la suda kruco

La Esperanto-movado en Ĉinio kaj Japanio – Dua Parto

EL INTERAKTIVA PREZENTAĴO FACILIGITA DE PAUL DESAILLY (ADELAJDO)

La sekvaj eroj el la prezentaĵo de Paul mi elektis por doni ian scion pri ties senĉesa laboro por varbi novajn lernantojn al nia lingvo. La tuta originalo estis en la angla kaj kiel en la titolo estis "interaktiva". Pro tio mi ellasis tiujn partojn kiuj vere bezonas aŭskultantaron. La unua parto estis en la Marta eldono de ESSK sub la titolo Esperanto: Universala help-lingvo. Red.



Paul Joseph Desailly

4a) Diversaj tavoloj de multaj socioj ofte rimarkas, ke la plej granda tasko en la mondo hodiaŭ estas kompreni niajn najbarojn kaj de ili kompreniĝi. En nia erao ne ekzistas manko de teknikaj rimedoj por komuniki. Sed pli kaj pli ni ne volas aŭ apenaŭ toleras vidalvidan rilatadon malgraŭ tiuj teknologiaj mirindaĵoj. La pasinteco indikas kiom rapide ŝanĝiĝas la lingvosituacio internacia. Ekzemple, se mi estus instruinta la anglan en Pekino antaŭ 2 generacioj, malliberejo por spionoj estus mia sorto ĉar la Popola Respubliko de Ĉinio tiutempe tre subtenis la rusan lingvon. Kio politike okazis? Nuntempe malmultaj ĉinoj studas la iam vaste disvastiĝintan lingvon de Tolstojo kaj ĝian belsonecon.

(4b) Granda triumfo dotita al la angla lingvo nuntempe en Ĉinio preskaŭ trafis politikan mortpafon de simila kunteksto en 1999 kiam la bomboj de NATO detruis la ambasadorejon de Ĉinio en Jugoslavio. Ĉu kulpas miscelitaj misiloj aŭ freneza nekonformulo de la CIA aŭ, aŭ, aŭ...? Por multaj eŭropdevenaj eksterlandanoj tiutempe laborantaj en Ĉinio (sed mi ĝojas diri, ne por Esperanto-instruistoj!) tiu tumulto semajno estis – antaŭ ol Jiang Zemin fine akceptis publikajn kaj privatajn pardonpetojn de Bill Clinton – tre danĝera travivintaĵo. Kiam la financ-imperio de *Wall Street* disiĝos (kiel nepre okazas ĉe ĉiu imperio!), kvankam malmultaj usonanoj aŭ iliaj amikoj en satelitaj landoj antaŭvidas aŭ volas vidi ĝian malaperon, kiu inteligenta homo en Ĉinio daŭrigos studadon de la ekstreme malfacila lingvo de Ŝekspiro?

(4c) Pripensu abruptan malsukceson de la imperia lingvo, la manĉua. Kvankam tra la landego de Konfuceo dum generacioj ĝi estis la primara lingvo de la dinastio Qing (1636-1911), nek la lasta imperiestro (Pu Yi, 1906-1967) nek lia frato Pu Jie (1907-1994) ĝin scipovis. Iliaj parencoj ankoraŭ vivantaj en Japanio, kaj neniuj en Ĉinio ekster provinco Xinjiang aŭ inter la intelektularo, kapablas flue paroli tiun Ŝemidan lingvon. Malgraŭ ediktoj kaj penadoj de la imperiaj prapatroj de Pu Yi por nutri, kaj poste revivigi la potencon manĉu-lingvon nur dudeko da parolantoj de la

t.n. pura manĉu-varianto vivas hodiaŭ en Beijing, Ŝenyang (iame Mukden) kaj eble en iuj urboj apud la Maro Bohai.

(5) Kie hodiaŭ estas la franca lingvo parolata? Oficiale, en tridek landoj; rekordo elstara! Kiel internacia lingvo la melodiaj sed malfacilaj francaj verboj pli kaj pli malpopolariĝis post la du mondmilitoj kiam la famo de la angla subite (laŭ historia takso) eklipsis ĉiujn 7.000 lingvojn. Dum pluraj jarcentoj ĝis 1945 la nacia lingvo de miaj francaj prapatroj furoris, aparte inter sekularaj elitoj, kiel la sola irebla vojo en la rolo de internacia lingvo. La monda historio estas plena je similaj rakontoj: fascinas min la antikva greka, la latina, la klasika araba, la hebrea, la persa kaj antikvaj ĉinaj lingvoj por nomi kelkajn influajn lingvojn. Spuroj pri la potenco kaj populareco de la lingvo de Voltaire multflanke restas eĉ hodiaŭ. (a) Diplomatoj: la franca estas foje nomata la lingvo de diplomatio (b) Aristokratoj: reĝoj, reĝinoj, princinoj, dukoj k.t.p. ankoraŭ ĝin uzas. (c) Olimpio: la olimpiaj ludoj rekonstruiĝis de la francoj en 1896. (d) Poŝtoŭicejoj tra la mondo nomiale akceptas en skribita formo la francan por asekuri pakaĵojn k.t.p. (e) Industrio: parizaj vest-modoj, parfumoj,



Paul en Esperanto sekcio de Ĉina Radio Internacia 1998

turismo, kuirarto, vinberkultivado...

(6a) La Konstitucio de la Popola Respubliko de Ĉinio (1954, 1975, 1978, 1982) protektas lingvarajtojn de la 55 minoritatoj ĉinaj. La Interna Ideo de Esperanto pli ol nomiale subtenas egalecon de rajtoj por ĉiuj naciecoj, klasoj, religioj, seksoj k.t.p. <http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/ESK-131-jun2018.pdf> p 23-25. Konsekvence la ĉinaj registaro kaj popolo estime taksas Esperanton kaj do daŭre financas du Esperanto-teamojn en la publika servo de la centra registaro por (a) rete aperigi unu el la plej belaj Esperanto-revuoj en la mondo, kaj (b) enscenigi profesiajn programojn televide kaj radie dis-sendatajn ĉiutage el tre modernaj studioj de Ĉina Radio Internacia –tute en la zamenhofa lingvo. Kaj, dum la ekonomia stelo de Ĉinio ree brilas, la neregistara Esperanto-movado pli kaj pli aktivas por kvazaŭ proklami laŭ antikva slogano tre konata en la sudaj provincoj: "La montoj estas altaj kaj la imperiestro

estas malproksima.”

(6b) En danĝeraj tagoj ni serĉas verajn amikojn. Je la 9a de decembro 1939 la Kuomintang kun usona financa helpo – kadre de intermortiga kaj triflanka konflikto kiu inkluzivis armeojn de la japana militistaro – preskaŭ finis la revolucion de prezidento Mao ĝis li siavice ricevis multan sovetian financadon. En tiu vintra tago Mao Tse-tung skribis al Esperanto-ekspozicio okazigita en Yan'an, Ĉinio: “Mi dirus ankoraŭ la samon. Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucion, do Esperanto povas esti lernata kaj devus esti lernata.” Vd: La Verda Spiko, Guangdong, Marto, 2005. Iuj fontoj citas: “devas esti lernata”. Vidu ankaŭ la duan alineon:

http://esperanto.china.org.cn/2017-07/24/content_41274679.htm.

(7) Multaj sensciuloj asertas malĝuste ke Esperanto estas senkultura; sennombraj komentistoj aldonas, ĝuste sed ofte kun malestimo, ke ĝi estas artefarita. Eksterordinara kvanto da originala kaj tradukita Esperanto-materialo aperis de post kiam la Bialistoka okulisto, Ludovik Zamenhof, unuafoje prezentis la Internacian Lingvon en 1887. En nia erao tre sukcesas Esperanto en la etero, per Google-Tradukilo. (<https://translate.google.com/?hl=eo>), Vikipedio (<https://eo.wikipedia.org>) kaj Amikumu (<https://amikumu.com/eo>). Multaj talentaj famuloj aŭ parolis aŭ promociis Esperanton: Tolstoj, Sun Yat Sen, Diesel, Castro, Tagore, Tito, Baden Powell, Abdu'l-Baha kaj diversaj gereĝoj kaj papoj, por nomi nur kelkajn. (*p63) Ĉu ili estus farintaj tion se la lingvo ne estus rekomendinda? <http://www.ipernity.com/blog/32119/295799>

(8) Aldonaj avantaĝoj jam establitaj en la Esperanto-mikrokosmo inkludas modernajn miraklojn: t.e. (a) klera, sendependa kaj tutmonda amas-komunikilaro: gazetoj, programoj radiaj kaj televidaj; (b) malkomplika gramatiko, abunda vortostoko, geniaj afiksoj, korelativoj ktp de Esperanto por helpi vin lerni aliajn lingvojn propedeŭtike; (c) senpaga loĝigo en la hejmoj de esperantistoj. Ĉi-lastata servo disponeblas en centoj da lokoj tra la mondo. En iuj ĉefurboj deko da elektoj disponeblas. Jen praktika helpo por mond-vojaĝantoj junaj kaj ne plu junaj: Pasporta Servo <https://pasportaservo.org>. Aldone al tio, diversaj loĝejoj, centroj ktp, eĉ meze de Tokio ĉe la Ginza, estas je via dispono: Kameoka.

(9) Multaj azianoj hodiaŭ aprezas la potencon de la tre okcidenta angla lingvo, sed amo nepre necesas, se oni volas reciproke interkompreniĝi kaj engaĝi la koron kaj animon de kiu ajn lingvo. Tio estas, ĝia humuro kaj ĝia poezio. Poezio estas multe pli efika kaj kompleta ol prozo. Ĝi instigas pli profunde ĉar ĝi estas pli fajna. Pri la beleco de la rimoj de Baudelaire, Li Bai, Puŝkin kaj eĉ de la versoj de persoj: multaj esperantistoj surprize asertas, ke la zamenhofa lingvo, danke al ĝiaj logika strukturo kaj melodia tono, egaligas la metron kaj rimadon de pluraj klasikaj poemoj. Ni sendepende esploru la veron pri tiu mirinda aserto kaj malkovru, kia estas Esperanto. Vi, samideano, bonvolu esti nova instruisto aŭ faciliganto por laŭtlegi aŭ deklami poemon en via naci-lingvo kaj por sekve demonstri belsonecon kaj flekseblecon de la Internacia Lingvo danke al spertaj tradukoj de interalie Ludoviko kaj Lidia Zamenhof.

Senpluveco – En krizo ĉu oni serĉu kulpanton?

TERRY MANLEY (ARMIDALE)

Mi loĝas en regiono nomata “Nova Anglujo”. Kiam la angloj alvenis antaŭ proksimume cent okdek jaroj ili rimarkis similecojn al ties hejmlando:- malvarmecon en vintro kun neoftaj neĝfaloj; ondformajn montetojn; verdajn kampojn sub disa arbaro; riveretojn. Do por similigi la medion eĉ pli ili forhakis lokajn plantspecojn kaj plantis eŭropajn specojn kiel kverkojn, ulmojn, poplojn kaj salikojn ĉirkaŭ ties kamparaj domoj kaj en ties urbojn. Kaj por vivsubteni sin ili plantis grenojn, legomojn, frukarbojn kaj paŝtejojn. Ili alvenigis ŝafarojn. Kiam Ludoviko Leichhardt preterpasis en Decembro 1844 estis krizo pro ekstersezona vetero. Neĝis kaj multaj ŝafoj mortis.

Armidaletroviĝas sur la ĉefa montĉeno de orienta Aŭstralio ĉe la sudo de la tiel nomata regiono Nova Anglujo. Ĉe 1000 metroj super marnivelo la klimato estas pli malvarma kaj pli malseka ol ĉe la regionoj ĉe la okcidento, sed pli seka kaj malvarma ol ĉe la marbordo, 200 kilometrojn orienten. Kun kutima pluvo je ĉ. 760mm jare la ĉirkaŭaĵo aspektas sufiĉe agrabla kaj verda.



Loka pinarbaro en kiu multaj arboj mortas

Mi alvenis por loĝi ĉi tie en 2006. Oni diris tiam ke la urbo estas bonŝanca pro la abundo de havebla akvo kaj milda klimato. Ĝi produktas tre fajnan lanon ankoraŭ valora en la mondmerkato kaj havas universitaton por plu subteni la lokan ekonomion.

Sed estis granda ŝoko kiam antaŭ jaro la loka registraro informis nin ke pro senpluveco oni devas pli ŝpari akvon. Do ili komencis limigi la uzon de akvo. Ĉi jare la cirkonstancoj pligraviĝis. Ĝis nun la pluvo por la jaro estas 223mm. Triono de la kutima falo. En la urbo oni ne plu rajtas akvumi la ĝardenon el la kranio de la loka registraro. Dum la akvoabundaj jaroj la loĝantaro



Fumŝirmita sunleviĝo de mia hejmo

alkutimiĝis al malŝparado de akvo. Do nia uzado estis 220 litroj tage po persono. Iom pli ol la nacia averaĝo. Nun pro minaco de la ebla foruzo, la lokanoj provas limigi uzon al 160 litroj. Sed ĉu tiom ankoraŭ troas? La loka registraro taksas ke la kvanto da akvo restanta provizos por proksimume unu jaro. Kun prognozo de malmulte da pluvo en la somero la situacio estas gravega.

Apud la aviadilhaveno estis farmbieno de la fruaj tagoj de nia urbo. Antaŭ 150 jaroj oni plantis kverkojn, pinojn, kaj similajn ekzotikajn arbojn. Dum tiuj 150 jaroj tiuj daŭre kreskis tra periodoj de pluveco kaj senpluveco. Sed ne plu. Nun ili mortas. Same kiel la altaj

arboj en nia centra parko. La eŭkaliptoj sur la deklivoj de la ĉirkaŭantaj montetoj tiom sekiĝis ke ili aspektas mortaj. La incendioj en la arbaroj, ne tre proksimaj ĝis nun, ŝtormas pelataj de fortaj ventoj kaj altaj temperaturoj. En tiaj cirkonstancoj la loka konservema registraro voĉdonis unuanime por deklari klimatan krizostaton. Sed kontraŭe la nacia konservema partio ne permesas al ties dungitoj menciion de la klimata krizo rilate al la fajroj. Ili opinias ke estas senkompatate al la viktimoj de la fajroj menciion kaj enhavas politikan celon.

Do ĉu estas etike neagrabla menciion la kaŭzojn por la krizo dum krizo?



La skribinto kun nova korodimuna ŝtala akvujo - espereble pluvos!!

Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto Kongreso kaj Somerkursaro Aŭklando, Nov-Zelando – Januaron 2020



St Francis Retreat Centre

<http://aea.esperanto.org.au/congress/>

<http://aea.esperanto.org.au/kongreso/?lang=eo>

10 – 19 January 2020 ST. FRANCIS RETREAT CENTRE
50 Hillsborough Road, Mt Roskill, Auckland, New Zealand

INSTRUISTOJ

Stefan MacGill

Biografio el ONDO:

MacGill, Stefan. Naskiĝis en Nov-Zelando en 1948.

Denaska esperantisto. Kunfondinto de Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando (1964) kaj aktivulo tie ĝis 1972.

Studis ĉe Universitatoj Victoria, Canterbury kaj Massey (1969-75), ĉefe geografion.

Diplomiĝis instruisto por elementaj lernejoj en 1974, agis en la instruista asocio en Nov-Zelando. Volontulo (la dua en la programo) en la CO de UEA (1976), oficisto (1977-86). Redaktoro/kunordiganto de Jarlibro (76-86), teknika redaktoro de Kontakto (78-86).

Vicprez. de TEJO (1977-79), prez. (1979-80). Motoro de la unua subvenciata seminario de



TEJO en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo – postsekvantoj liveris al TEJO centmilojn da eŭroj. Direktoro de CO (1980-84). Redaktoro de Juna amiko (1986-96 kaj 2000-2013); ĝin administris tra tridek jaroj. Vicprez. de Internacia Ligo de Esperantistoj (ILEI, 1989-92), prezidanto (1992-94 kaj 2009-2013). Restariginto de la ekzamenoj UEA/ILEI kaj ĝia sekretario (1989-93) kun 41 sesioj kun 335 sukcesintoj. Gvidis kursojn kaj ekzamensesiojn en multaj landoj. Redaktis kaj kunlaboradas kun Internacia Pedagogia Revuo.

Profesie ekde 1989 verkas help-takstojn por komputilaj programoj (i.a. optika karaktro-rekono). Esploras lingvo-didaktikon kaj preparas esperantajn instru-materialojn. Vivas en Hungario de post 1986. Havas tri filinojn, Karina (1990), Hajnal (1992) kaj Sonja (2000) - denaskaj esperantistoj.

Ekde 2013 vicprezidanto de UEA; funkciigis la programon de Aktivula Maturigo, kun 27 AMO-seminarioj en kvar kontinentoj ene de 21 monatoj kune kun certigo pri daŭripovo de la programo. Verkis kaj dissendis ekde 2013 pli ol 140 estrarajn komunikojn (EKO) al Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj multaj aliaj - averaĝe po unu semajne; konceptis la programon 'Ni semas' kaj multon pli. Pluiraj streboj ene de UEA: unua Universala Kongreso en Afriko frue en la sekva jardeko; nova rolo por kontinentaj kongresoj, kreskigo de rimedoj por movada evoluigo je 30% ĉiujare, i.a. per subvencipetado, junigo de la asocia membraro, kreo de gvidiloj por aktivuloj. Ĉiutere, realigo de konkretaj rezultoj.

Ĉefaj verkoj:

1979 k.1989 - La laŭta vekhorloĝo. 32-paĝa legolibro. Dua eldono: HEA. Kvar

rakontoj kun ekzercoj.

1981 - Tridek roluloj. 84 paĝoj. Kvin teatraĵetoj kun ekzercoj; por lingvo-lernantoj.

1985 - Pordoj. 88 paĝoj. Simplaj teatraĵetoj por lingvo-lernantoj.

1986 - Streĉ' eĉ, Steĉj Skeĉ'. 88 paĝoj. Ne-simplaj skeĉoj.

1989 - Gvidilo por la elementa kaj meza niveloj de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI.

1991 - Najbaroj kaj boroj. 216 paĝoj. Edistudio. Du teatraĵoj kun ekzercoj.

1991 - Tendaraj tagoj: kajero 1: (1991), kajero 2 (1992), kajero 3 (1993).

1996 - Mazi en Gondolando: traduk-helpado. Apoga materialo (apenaŭ eldonita).

1998 - Ekzercoj por la vid-bendo 'Pasporto al la Tuta Mondo'.

2006 - Kontribuinto kaj kunlaborinto en Manlibro de Esperanto, ILEI, 200p.

2007 - Nemave Edifi, FEL, 264p. Kvar teatraĵoj, sep eroj.



Duncan Charters

Duncan Charters estas universitata profesoro pri lingvoj ĉe Principia College en Usono, kaj esperantisto de baldaŭ post interesiĝo pri la studado

de lingvoj. De julio 2019 li estas la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, UEA.

Post diplomiĝo ĉe la Universitato de Kembriĝo, Anglujo, kie li studis la francan kaj hispanan lingvojn, D-ro Duncan Charters doktoriĝis ĉe la Universitato de Indiana pri hispanaj studoj: lingvo, lingvistiko, kulturo, literaturo kaj instrumentoj pri lingvoj, kun kromstudoj pri la historio de Latina Ameriko. Li estas program-aprezisto, konsilisto kaj prelegisto por lernejoj kaj organizaĵoj inkluzive de la ŝtataj programoj pri edukado de Kalifornio kaj Ilinojso.

D-ro Charters havas diversajn esplorinteresojn, verkiinte kaj prezentinte amplekse pri metodoj de lingvolernado inkluzive la

instruadon de kulturo kaj literaturo kaj la efika uzado de teknologio por evoluigi lingvan lertecon, speciale aŭskultokomprenon. Li studis kaj publikigis artikolon pri la poliglota fenomeno kaj kiel poliglotoj akiras la kompetenton lerni plurajn aliajn lingvojn. Krom la hispanan, li ankaŭ studas la fenomenon de Esperanto kaj flueparolas la Internacian Lingvon.

En 2016, D-ro Charters elektiĝis al la Akademio de Esperanto, kiu kontrolas la evoluon de la lingvo. Li dum multaj jaroj instruis Esperanton, kaj prezidis la Internacian Ekzamenan Komisionon kaj ankaŭ la Internacian Ligon de Esperantistaj Instruistoj, ILEI.

Bonfarta tago pri la sensoj

Melburna Esperanto-Asocio kun Torquay Wellness Community

MARUMI SMITH (TORQUAY)

Gardu vin kontraŭ emocia manio,
aliflanke, gardu vin kontraŭ malsentemeco!

-John William Travis

Homoj ĉiuj serĉas ŝancojn havi pli grandan regadon pri sia sano. Ni ĉiuj ŝatas havi pli da bonfarta energio kaj vivi signifoplene, ne nur vigele.

Laŭ la Usona Nacia Esplora Instituto pri la Homa Genomo, ekde la fino de la mapado de ĉiuj homaj genoj en 2003, pli malmultekosta kaj pli rapida genoma medicino nun estas vaste havebla en sanzorgado. Ekipita kun pli da ne-invada teknologio, progresanta genoma medicino ebligas pli bonan komprenon de biologio kaj kronikaj malsanoj per la evoluigo de pli individuaj, precize celitaj medikamentoj.

Nuntempe la Komuna ejo pri Genomaj Datumoj de la Nacia Kancera Instituto ĉe la Universitato de Ĉikago konservas la plej grandan datumaron pri kancero en la mondo kun pli ol 5 petabajtoj da datumoj pri kanceraj genomaj el 39 fontoj, konservitaj ĉe IBM Cloud. Kvankam disponeblas dumviva medicina gvatprogramo por postvivantoj de kronikaj malsanoj, tamen oni neeviteble bezonas refokusi ĉe la memo kaj ties medio per emocioj kaj spiritaj dimensioj.

Homoj okupiĝas pri ĉiutagaj

agadoj de energiaj eniro kaj eliro, kiel sentado kaj esprimo de emocioj, kiuj utilas por instigi kaj pensadon kaj agadon.

Laŭ esploroj de Cerbaj Ligoj, lernado de dua lingvo, kiel Esperanto, estas asociita kun la kombino de sensaj kaj movaj procezoj. La regiono de Broca, en la frunta lobo de la cerbo, respondecas pri parolado kaj prononcado, regante la movadon de la buŝo, la lango kaj la palato. La regiono de Wernicke en la maldekstra tempia lobo respondecas pri lingva evoluigo kaj kompreno. Unu-sonaj vortoj nomiĝas “fonemoj”, kaj lerni novajn strangajn fonemojn eblas per la troigado kaj ripetado de tiuj vortoj. Tamen plenkreskuloj ne facile lernas novajn sonojn kompare kun junuloj. Laŭ esploroj de UCLA, la plej dinamika aĝo por cerba kresko en lingvolernado finiĝas inter 6-13 jaraĝa, kontraste al pli frua esplorado kiu proponis, ke tio okazu inter 1-3 jaraĝa. (Cerbo-Ligo 2019).

Tamen spertuloj pri la sano de maljunuloj konsentas ke “lerni lingvon malfrue en la vivo estas bone ĉar tio helpas ekzerci la cerbon, kaj plibonigas la lertecojn pri problemsolvado.” (Mondly.com 2018) Do, ne estas tro malfrue ĉeesti klason pri la hispana aŭ Esperanto!

PARTO 1 Esperanto-renkontiĝo

Komitatanoj de la Melburna Esperanto-Asocio, Heather Helzingen, Joanne kaj Peter Johns, Peter Williamson kaj legenda Marcel



Leereveld, 102-jaraĝa, kune kun nova lernanto Patrick, kiu aliĝis al Torquay Esperanto-Kafeja Klubo dum tagmanĝo la 20an de Oktobro 2019,

kaj kun la lokaj esperantistoj: John kaj Elrae Adams, Gary kaj Marumi Smith.

John Adams, sekretario de la Torquay-Klubo, prezentis sian rakonton pri japana Esperanto-advokato, S-ro Etsuo Miyoshi, kiu estis la direktoro de la kompanio Swany. Swany produktas valizojn, kiuj havas helpilojn por handikapuloj, ekzemple, 4 radojn, kiuj kapablas puŝiĝi en ĉiujn direktojn, kontraste al kutimaj valizoj kiuj havas nur du radojn. Naskita kun polio, S-ro Miyoshi ĝuis vojaĝi kaj viziti Esperanto-kongresojn kaj amikojn en multaj landoj ĝis sia forpaso.

Marumi Smith parolis pri la planto “Botelo-kalabaso” (*Lagenaria siceraria*), specife pri ĝia historio kaj uzado por medicino, kosmetikaĵoj, muzikaj instrumentoj, manĝaĵoj kaj pli.

PARTO 2 Esperanto-Grupo aliĝas al Bonfarta Grupo, kun la temo “Sensado kaj Via Bonfarto”

La “Wellness Salon” Serio estis fondata en 2009, de Wellness Miroku ĉe la centro de sano kaj bonfarto en la Melburna urbocentro. Post tiam ili disponigis plaĉigan spacon al partoprenantoj por esplori diversajn elementojn en la vivo





kaj ekvilibrigi tiujn elementojn. Kontemplantu pri kiel bone aŭ nebone oni turnas la propran Bonfartan Radon povas konduki al pli signifoplena vivo.

Temoj de antaŭaj kunsidoj inkluzivas: Mem-Respondecon kaj Mem-Amon; Spiradon; Movadon; Sensadon; Manĝadon; Sentadon; Pensadon; Ludadon kaj Laboradon; Komunikadon; Intimecon; Trovante Signifon; kaj Transcendadon. Ĉiuj prezentitaj laŭ la gvidaj konceptoj pri bonfarto, inkluzive de la programo de Internacia Bonfarta Inventaro de John W Travis, uzante la iniciatojn de pozitivaj emocioj kaj la fortoj de la Pozitivaj Psikologoj.

La temo de la renkontiĝo estis Via Sensemo, unu elemento de la bunta *Bonfarta Rado*. La *Bonfarta Rado* kreita de John W Travis, kaptas kompleksajn vivajn fazojn kaj problemojn en simpla kaj praktika, eĉ mezurebla maniero, por helpi homojn prosperi kaj gustumi viclecon malgraŭ ties sanstato.

Tri principoj de la “Wellness Salon” de Wellness Miroku deklaras ke:

1. Partopreno estas memprovigo.

Partoprenantoj povas sperti la ĝojon liberigi la pensojn, lernante de la ĉeestantoj kaj partoprenantoj, kiuj havas malsamajn spertojn kaj opiniojn.

2. Konektado kun samideanoj:

Multaj studoj identigas “izolecon” kaj “malkonektiĝon” kiel la plej oftaj fontoj de mensmalsaneco, ekzemple deprimiĝo kaj malpliigita sento de bonfarto. Tiuj estas pli evidentaj en rapide progresantaj teknologiaj socioj (Frederickson 2013). Ĝenerale homoj multe pli bonfartas, kiam ili havas pozitivajn perspektivojn.

3. Plej grave, ni kaptu la ŝancon rimarki ion novan pri ni mem, pri aliaj aŭ pri nia medio. Malgranda semo de memkompreno, ligiĝas al via bonfarto per la sensmetodo “Molaj Okuloj”. Per niaj sensoj vidi, tuŝi, flari, aŭdi, gustumi kaj moviĝi, oni aprezas kaj ĝuas sian vivon. Kiel oni povas uzi la sensojn por plibonigi bonfarton kaj kultivi forton por venki defiojn?

MEA-prezidanto Joanne Johns kaj veterana komitatano Heather Heldzingen donis amikajn kaj koncizajn paroladojn pri kio Esperanto ofertas al la publiko, pri kiel ĝi riĉigas la vivon de homoj, kaj pri kiel Esperanto-lernado ŝanĝis iliajn proprajn vivojn. Ni ricevis pozitivajn komentojn pri Esperanto-lernado de pli ol 30 partoprenantoj. Joanne kaj Peter Johns montris sian originalan popolmuzikon en Esperanto per iPad, kiel la muzikistoj *EKDE TIAM*.

Eksterordinara forĝartisto David Graham de *Simplyforged* de *Torquay Ashmore Arts* rakontis sian sperton pri la kreado de unikaj ferartaĵoj, faritaj uzante fornegojn kaj martelon. Unu el tiuj estas lia lastatempa 150-kg skulptaĵo de naturgranda aglo.

Tobi Bochholt de *Metal Monkey Knives* de *Ashmore Arts* rakontis pri siaj premiitaj kuirejoj

tranĉiloj, menciante kiel lia artaĵo inspiras lian kreemon kaj bone konservas lian sanon dum li instruas la germanan lingvon en gimnazio.

Mirinda kontribuo de irlanda muziko farita de psikologo kaj kompetenta muzikisto Gary Banks estis la plej elstara programero de la posttagmezo. Li kantis inspirigajn kantojn kiuj rilatis al sensado, reflektante pri lia lastatempa vojaĝo por kantverki kaj muziki en lia plej ŝatata loko, Irlando.

La gastronomiaj organoj de 32 partoprenantoj satiĝis per la bongustaj manĝaĵetoj, kukoj, kaj fruktoj de la Kafejo *Bird Rock*, sendante tiujn hejmen kun belaj ridetoj.



Bab.la

DAVID ROCKELL (NZ)

Tute hazarde mi trovis tre utilan retpaĝaron lastatempe.


Dum mia legado de la Biblio, mi min demandis, ĝuste kion signifas la vorto "Mamono" (en la originala greka: μαμωνά), vd. Luko 16:13. Do, mi decidis serĉi ĝin en la retaj vortaroj. Mi ne trovis tiun vorton, sed mi ja trovis la sekvantan:

English-Esperanto dictionary
- translation - bab.la

[https://en.bab.la/dictionary/
english-esperanto/](https://en.bab.la/dictionary/english-esperanto/)

Por provi ĝin, mi serĉis la tradukon de "power cut", kaj trovis ĝin sub la angla "power failure" (kurentpaneo). Pli frue tiun tagon, mi vane serĉis ĝin en kaj Wells kaj Benson.

Parenteze, mi poste trovis la respondon al mia unua demando. Mamono estas transskribo de la originala aramea vorto, kiun Jesuo uzis. Do, la kutimo transskribi fremdajn nomojn en la propran alfabeton estas tre malnova; kaj Mateo kaj Luko ĝin sekvis.



Anstataŭaĵo por rompita orgeno

Dum jarcento kanto ĉirkaŭis la mondon, kantata en Anglujo, Italujo, Usono, Francujo, Svedujo kaj Rusujo; en la etiopa, la araba, la ĉina, la indonezia, la malaja, la japana, la hispana, la hungara - en ĉiu imagebla lingvo ĝi ĉeestas kiam alvenas la festivalo de Kristnasko! "Paca Nokt', Sankt-vesper'", nia plej korsentiga germana kristnaska kanto. Sed ĝi ne devenas de la plumo de Goethe kaj ne venas de Haydn la melodio. Estis du amikoj kiuj kreis la kanton kiu plej influis la mondon: la instruisto Franz Xaver Gruber kaj la vikario Joseph Mohr. Ambaŭ estis loĝantaj en Salzburg, kaj certe estus forgesitaj antaŭ longe, se ilia kanto "Paca Nokt'" ne famigis ilin.

Kiuj iras al Hallein en Salzburg, ne maltrafu la viziton al la "Kelta Muzeo". Ĉar estas tie la "Ĉambro de Gruber" por viziti, en kiu la dankema urbo kreis eternan memoron al ĝia fama filo. Ĝi ankaŭ enhavas la originalan partituron de la kristnaska kanto kaj la modestan bienon de Franz Xaver Gruber, kiu laboris kiel korusestro en Hallein ĝis li forpasis la 7an de junio 1863 je la aĝo 76.

Kiam Gruber estis 31 jara, la kalendaro indikis la jaron 1818; La Viena Kongreso ĵus finiĝis antaŭ tri jaroj. Pro ĝiaj provizaĵoj, Aŭstrujo devis transdoni Belgion al Nederlando kaj Breisgaŭ kaj apudajn regionojn al Baden-Virtembergo. Ĝi estis reveninta al siaj malnovaj teritorioj: Tirolo, Vorarlbergo, Karintio, Carniolo, Triesto, Galicio, Milano, Veneto kaj Salzburgo. Tiutempe, landoj kaj urboj interŝanĝiĝis inter posedlandoj, samkiel la uzataj aŭtoj de hodiaŭ. La iama germana

ĉefdiocezo de Salzburgo falis en 1805 en la "Paco de Presburgo" al Aŭstrujo, antaŭe ĝi apartenis al la Grandduklando de Toskanio. En la "viena paco" de 1809 Salzburgo fariĝis disponebla al Napoleono la 1-a, kiu donis ĝin al Bavario en 1810. Post la "pariza paco" de 1814 Salzburgo estis reregata de Aŭstrujo kun parto de ĝia tero. Do en 1818 Salzburg refoje estis aŭstria, sed por homoj ĉi tiu politika ŝanĝo ne influis la vivon. Ili parolis la saman lingvon kaj kantis la samajn kantojn. Oni estis nek pli riĉa nek pli malriĉa. La ordinara homo malsatis kiel ĉiam.

Kelkajn tagojn antaŭ la kristana festivalo de ĉi tiu jaro Franz Xaver Gruber (kiu poste fondis la "Liedertafel" kantoklubon kiu ankoraŭ hodiaŭ ekzistas), malkovris ke muso manĝis tra la ledaj balgobloviloj de la orgeno. Ĉi tiu malgranda truo malebligis la ludadon de la orgeno, ĉar la aero eskapis anstataŭ atingi la tubojn. Gruber estis senespera. Kial la orgeno de la preĝejo de Sankta Nikolo devis rompiĝi nun!? Kiel li prediku la "Koruson de la Anĝeloj" je kristnaska nokto, kiam ne estas aero en la tuboj?

Subite Gruber ekhavis ideon: li kuris al la ŝuisto Johann kaj rakontis al li pri la malbonaĵo kiun la muso kaŭzis. La ŝuisto ekzamenis la pedalon kaj detruis la lastan esperon de Gruber: "Mi ne povas glui aŭ kudri en la faldon. Devas esti nova ledado, kaj tion povas krei nur la konstruisto de orgenoj". Seniluziigite, Gruber iris al la juna vikario Joseph Mohr kaj rakontis al li pri la mispaŝo. Sed Mohr ankaŭ ne havis konsilon: "Nun ni ne povas akiri orgeno-konstruiston, ĉar ili volas esti kun siaj familioj dum Kristnasko kaj nur refoje eklaboros en

januaro. Kaj cetera nia monujo estas malplena - ni eĉ ne povus pagi lin". Sed anstataŭ senkuraĝiĝi, la instruisto rektiĝis memfide: "Verŝajne estas aliaj instrumentoj. Ni devos daŭrigi sen orgeno."

La vikario kapneis: "Ĉi tiuj kantoj estas faritaj por la orgeno. Vi ne povas simple ludi ilin per luto aŭ violono."

"Tiuokaze ni simple faros novan kristnaskan kanton por la luto. Kristnasko sen muziko estas nur tragedio."

Gruber parolis kun la vikario ĝis li diris, "Vi pravas. Ni almenaŭ provu ĝin." Tiun saman vesperon, la vikario Mohr sidis en la malvarma preĝejo de Oberndorf kaj esperis por ĉiela inspiro. Li ekbruligis kandelon antaŭ la bildo de la Patrino de Dio kaj de tempo al tempo tenis siajn malsekajn fingrojn kontraŭ la malgranda flamo. Ekstere fariĝis nokto, kaj la malvarmo penetris senkompate en la preĝejon. Mohr estis malriĉa pastra asistanto kiu translokiĝis de preĝejo al preĝejo kaj vivis nur per la malmultaj rimedoj, kiujn la pastro donis al li por lia helpo. Klinita kaj glaciigita, li kaŭris sur la preĝbenko kaj aŭskultis la malluman nokton. Sed li ne volis pensi pri io ajn. "Kara Dio, donu al mi linion," li petegis mallaŭte. Kaj subite li laŭte diris: "Paca Nokt', Sankt-vesper'". Kaj poste li trovis vortojn, liniojn, rimojn tute adaptitajn al ĉi tiu humoro: "Dormas jam tuta ter'... Nur rigardas la sankta hom-par'... Kies Bebo kun bukla harar'... Dormas en sonĝa ĉarm'."

Malrapide linio post linio estis aldonita. La juna vikario neniam provis poezion, kaj en normalaj cirkonstancoj li ne estus verkinta ion ajn. Sed ĉi tie, en la malhela preĝejo kun la malforta lumo de kandeloj, ĉio ĉirkaŭ li transformiĝis.

Li skribaĉis kvin strofojn sur la paperon, kaj poste la kandelo estingiĝis, kaj li vekigis kvazaŭ el sonĝo. Li kaŝeniris sian ĉambron, nur esperante, ke Gruber trovu favoron kun liaj linioj kaj komponu taŭgan melodion. Franz Xaver Gruber ankaŭ havis templimon. La 24a de decembro jam komenciĝis. "Lasu min sola, mi petas," li petis sian amikon, sidiĝante sur la lito kun sia gitaro kaj pikante akordojn sendistinge. Li neniam komponis melodion en sia vivo kaj multfoje substrekiis la vortojn de la saĝulo en la kantoteksto de la vikario: "Ĝi ne estas tiel!" Li admonis sin, kuŝiĝante, kaj fermante la okulojn. Kion rakontis al li Joseph Mohr? Li sidis sola en la silenta, malvarma preĝejo, kaj poste la melodio ekvenis al li. Subite li ne plu estis en sia ĉambro, kaj ne estis tagmezo, sed li sidis apud sia amiko sur la preĝbenko, frostiĝante kaj aŭskultante la malhelan silenton. Kaj tiel ekvenis la melodio.

Nun ili rapidis. Ene de du horoj ili provludis la kanton per du voĉoj, akompanataj nur de gitaro. "Espereble homoj ŝatos ĝin hodiaŭ en la kristnaska meso", Gruber diris. Kiam la preĝejo de Sankta Nikolao pleniĝis en la vintra nokto kaj ĉiuj atendis la unuajn sonojn de la orgeno, la vikario diris: "La orgeno estas rompita, muso manĝis la blagoblovilon kaj ni ne povas ludi ĝin, sed ni trovis kristnaskan karolon, kiun povas akompani gitaro."

La amikoj havis lampojn kaj estis plej surprizitaj pri ilia aŭdaco, sed tiam "Paca Nokt', Sankt-vesper'" eksonis la unuan fojon. La eklezianoj aŭskultis respektome, kaj kiam refoje kvietiĝis, unu el ili petis: "Kantu ĝin refoje, por ke ni ĉiuj povu kune kanti." La vikario kaj instruisto ĝojis.

Sed la kanto "Paca Nokt', Sankt-

vesper” verŝajne neniam estus tiel populara, se financaj malfacilaĵoj ne konstante trafis la paroĥon de Sankta Nikolo. Ĉar kiam, post silvestro, la orgenkonstruisto venis kaj anstataŭigis la manĝitajn blagobloviĵojn, la pastro simple ne sciis kiel pagi. Tamen la instruisto Gruber trovis rimedon: li sendis al la muzikamanta orgenkonstruisto folion da muziko kun la kompleta teksto de la kanto “Paca Nokto” kontraŭ la riparo.

Ĝuste tiu kantfolio estas konservata hodiaŭ en la Ĉambro de Gruber en Hallein, kaj sur ĝi aperas flanke manskribita noto de Gruber: “Edmund, jen la promesita kristnaska karolo. Do vi mem devas praktiki ĝin. Ĉion plej bonan al via edzino kaj infanoj, adiaŭ. Via amiko, Franz Gruber.” La konstruisto de orgenoj, okupata kaj vaste vojaĝanta viro, prenis la folion kun la simpla titolo “Weihnachtslied” dum li vojaĝis kaj laboris. Tiel estis ke ĝi ankaŭ venis en la Zillertal, de kie ĝin kondukis la fratoj Strasser al Leipzig. En 1838, la teksto estis eldonita la unuan fojon en Leipzig-gazeto, dum la melodio en la orgena libro troveblis en la katolika eldonaĵo la “Leipzig Kantobirdo” de la sama jaro. Kiam ĝi estis prezentita de la Berlina Katedrala Koruso en 1840, la prusa reĝo Frederiko Vilhelmo III-a ĵus mortis, kaj Frederiko Vilhelmo IV-a anstataŭis lin. La kanton aŭdis la reĝo, kaj tiel ĝi komencis sian triumfan procesion en Protestantan Prusion.

Sed neniu sciis de kie ĝi venis kaj kiu verkis ĝin. Do en la himnoj estis: “Popola kanto de nekonata deveno”. Reĝo Friedrich Wilhelm IV faris enketojn, kaj liaj agentoj sekvis la spurojn tra Dresdeno kaj Leipzig ĝis Zillertal kaj al Hallein.

En 1888, sepdek jarojn post la “premiero”, la melodio en ĉiuj kantlibroj estis oficiale atribuita al Franz Xaver Gruber. Unu jaron antaŭe “Paca Nokto” estis aldonita al la evangelia himnolibro pri Orienta kaj Okcidenta Prusio kun la noto “nekonata deveno”. Gruber ne spertis ĉion ĉi ĉar li mortis la 7an de junio 1863 je la aĝo 76, korusestro de la urbeto Hallein.

Joseph Mohr, la poeto de ĉi tiu kanto, nur prezentis sian unuan prezentadon en tiu kristnaska nokto de 1818. Jam la sekvan jaron li devis translokiĝi, ĉar liaj superuloj trovis lian gajecon kaj senzorgecon ne taŭgaj por pastro. Dum longa tempo li ne rajtas hejmlokigi sin. Jaron post jaro li ŝanĝis la paroĥon, pli suden al Sud-Tirola kaj reen al Salzburg, de kie li venis. Por la spirita sinjoro li estis “nigra ŝafo” ekde naskiĝo, ĉar Joseph Mohr, filo de la fraŭlino Anna Schöiber kaj dezerta musketisto Mohr, estis naskita en fifama Salzburga strateto, kaj neniu volis prizorgi la novnaskiton. Nur la ekzekutisto Wohlmutter deklaris sin preta. Sed li ankaŭ devis esti reprezentita, ĉar li estis konsiderata malhonora pro sia laboro. Kelkajn jarojn poste eklezia regulo de Salzburg ekprizorgis la brilan etulon; Joseph Mohr estis edukita en la koruso de la universitato, poste en la abatejo Kremsmünster. Sed kvankam li fariĝis bona muzikisto kaj atingis la spiritan dignon, li ne povis sin vivteni pro sia “fatala origino.” La paroĥaj pastroj baldaŭ “malkovris” impetan temperamenton, ribeleman naturon, aŭ ion alian, kiu ne konvenis al ili. Resume, ili ĉiam havis kialon por forsendi lin. Do lia sorto fariĝis vojaĝi kiel helpa pastro tra la lando, sen ricevi daŭran loĝadon.

Lia amikeco kun la instruisto Gruber

ankaŭ detruigis, ĉar la vikario devis plu translokiĝi. Kiam liaj haroj griziĝis kaj li mem laciĝis, la altrangaj sinjoroj en Salzburg rigardis kaj direktis lin al paroĥo en la fora bazaro de Vagrain. Liaj ŝafoj amis lin ĉar li estis sindona kaj helpis kie ajn li povis. Joseph Mohr havis bonan vorton por ĉiuj kaj ofte ankaŭ moneron. Kiam li mortis pro pneŭmonio en sia kvindeka jaro, li lasis nenion krom flikitan kapuĉon kaj tiujn versojn, kiuj estis tradukitaj al ĉiuj lingvoj: "Paca Nokt', Sankt-vesper'" La komunumo de Wagrain enterigis lin en malriĉan tombon kun simpla kruco sub 400-jaraĝa tilio. Intertempe ĉi tiu kruco fariĝis "loko de pilgrimado" kaj famiĝis; Tamen la komunumo anstataŭigis la krucon de malriĉulo per bela forĝofera kruco kun ŝildo.

Joseph Mohr kaj Franz Xaver Gruber ne havis facilajn vivojn. Post iliaj mortoj, la honoroj amasiĝis. En 1899, la preĝejo, kiu havis la mizeran premieron de la

kristnaska karolo "Paca Nokto", estis disfaligita kaj Paca Nokta Kapelo estis konstruita en la sama loko.

Ĉar la kristanismo troviĝas tra la tuta mondo, "Paca Nokt', Sankt-vesper'" fariĝis la epitomo de Kristnasko, kaj la plej multaj volas aŭdi ĝin en la Kristnaska Meso. Sed dum pluraj jardekoj, la batalo por ĉi tiu kanto bruletis. La fideluloj amis ĝin, dum la preĝejaj korusoj kaj multaj pastroj rezistis ĝin. "Malaltvalora kaj sentimentala kaj sen reala aserto pri la kristnaska mesaĝo" estis la juĝo de la eklezio dum longa tempo. Nur en 1974 la preĝeja historiisto Karl Amon en Graz pledis por ĉi tiu oficiale eksterleĝa kanto kaj deklaris, ke ĝi "enhavas bibliajn ideojn kaj kristnaskan proklamon". Post ĉio, post jardekoj de malkonsento, la plej disvastigita kristnaska kanto fine ricevis la oficialan benon: ĝi estis inkluzivita en la "Laŭdo de Dio", la katolika himnolibro - ĝia tutmonda populareco finfine triumfis.

Stille Nacht

Worte: Josef Mohr
Weise: Franz X. Gruber (1787 - 1863)

1. Still - le Nacht, Hei - li - ge Nacht!
2. Still - le Nacht, Hei - li - ge Nacht!
3. Still - le Nacht, Hei - li - ge Nacht!

1. Al - les schläft ein - sam wach!
2. Gut - ten Nacht, er - küh - le
3. Mir - sen er - küh - le

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Esther Parris | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Ivan Pivac | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@gmail.com
0800 350 781



KONGRESO DE ESPERANTO

kaj somerkursaro

aea.esperanto.org.au/kongreso

AŬKLANDO

10a-19a januaro 2020

